

Bahá'u'lláh

La Sep Valoj

Antaŭparolo*

»Iam parolis Ni en la lingvo de la leĝdonanto«, skribas Bahá'u'lláh en la *Epistolo al la Filo de la Lupo*, »altempe en tiu de la verserĉanto kaj la mistikulo«. ... ant 1

Dum la du jaroj en Irako, kiam Bahá'u'lláh retiriĝis al la montoj de Kurdio, for de la malicoj kaj kvereloj, kiuj estis subfosintaj la Báb-an komunumon en Bagdado, sciigo pri Lia estado en Sulajmanijo altiris religiajn klerulojn kaj mistikulojn de la regiono, inkluzive de kelkaj eminentaj sufiaj ŝejkoj, kiuj volis trovi Tium, Kiu vivis kiel humila derviŝo kaj tamen elmontris profundan saĝon kaj senegalan esprimkapablon: »Pere de Siaj multaj konversacioj kaj epistoloj«, skribas Shoghi Effendi, »Li malfermis novajn perspektivojn al ili, solvis la konfuzojn, kiuj agitis iliajn mensojn, klarigis la internan signifon de multaj ĝis tiam neklaraj eroj en la verkoj de diversaj komentistoj, poetoj kaj teologoj... »Ene de mallonga tempo«, estas la propra atesto de 'Abdu'l-Bahá, »Kurdio estis magnetizita per Lia amo. Dum ĉi tiu periodo Bahá'u'lláh vivis en malriĉeco. Liaj vestoj estis tiuj de povruoj kaj senhavuloj. ant 2

*El la antaŭparolo al *The Call of the Divine Beloved. Selected Mystical Works of Bahá'u'lláh* (La voko de la Dia Amato. Elektitaj mistikaj verkoj de Bahá'u'lláh), Bahaa Mondcentro, 2019

BAHÁ'U'LLÁH

Lia nutraĵo estis tiu de la senhavaj kaj humilaj. Etoso de majesto aŭreolis super Li kiel la suno je tagmezo. Ĉie oni Lin ege respektis kaj amis.«¹

ant 3 Kiam Bahá'u'lláh revenis al Bagdado, Liaj kurdaj admirantoj sekvis. Vidi ke ulemoj kaj sufiaj ŝejkoj grupiĝis por viziti Bahá'u'lláh-on mirigis la religiajn gvidantojn de la urbo, kiuj ankaŭ ko-mencis viziti Lin – kaj entuziasmiĝis. Ilia estimo al Li siavice allogis aliajn, de poetoj kaj mistikuloj ĝis registaraj funkciuloj, kaj tio plu disvastigis Lian famon.

ant 4 Ĉi tiu periodo, diras al ni Shoghi Effendi, atestis pri »enorma plimultiĝo, laŭ amplekso kaj kvanto, de verkoj de Bahá'u'lláh ... La versoj, kiuj dum tiuj jaroj elfluis el Lia plumo kaj kiujn Li mem priskribis kiel »abundan pluvon«, ĉu en la formo de epistoloj, admonoj, komentarioj, apologioj, disertacioj, profetaĵoj, preĝoj, odoj aŭ specifaj Tabeloj« revivigis kaj transformis la Báb-an komunumon. Estis periodo tiel fekunda, ke averaĝe la neregistritaj versoj revelaciitaj de Li dum unu sola diurno egalas laŭnombre tiujn de la Korano. »Tiuj versoj, kiujn Li aŭ diktis aŭ propramane skribis, estis laŭ nombro ne malpli rimarkindaj ol laŭ la riĉeco de sia enhavo aŭ la diverseco de la temoj traktataj.«²

ant 5 Inter la »netakseblaj trezoroj rivelitaj de la ondiĝanta oceano de la Revelacio de Bahá'u'lláh« en tiuj tagoj troviĝas la »plej granda mistika komponaĵo«, la

LA SEP VALOJ

Sep Valoj, kiu »priskribas la sep stadiojn, kiujn devas trairi la animo de la serĉanto antaŭ ol ĝi povas atingi la celon de sia ekzisto.«³ Skribante pri tio jarojn poste en Akko, Li klarigis:

Ĉi tiu traktaĵo estis revelaciita en la lingvo de la popolo, dum la tagoj antaŭ Nia Deklaro. La okazo por ĝia revelacio estis la ricevo de letero adresita al la Plej Sankta Kortego en Irako de sunaismano, kiu estis kaj klerulo kaj mistikulo. Pro tio estis ĉi tiu traktaĵo revelaciita, konforme al dia saĝo, laŭ la maniero kiu estis aktuala ene de la popolo. Tamen, en ĉi tiu tago vere atingis ĉiu animo, kiu fiksis sian rigardon je la Supera Horizonto kaj rekonis la unusolan veran Dion, ĉiun el la sep valoj aŭ sep stadioj menciitaj en ĝi.⁴

Kiel la dekdujarcenta poemo de 'Aṭṭār, *Mantiqū ʿ-Ṭayr* (*La Konferenco de la Birdoj*), priskribas la *Sep Valoj* vojaĝadon tra sep stadioj en serĉado de Dio. Tamen, la serĉado en la *Sep Valoj* estas ankaŭ farita sub la cirkonstancoj difinitaj per la tre baldaŭa aŭroro de la nova Revelacio – kaj efektive la ĉeesto de la Amato mem. ...

ant 6

La Sep Valoj

*Prezentado de la misteroj entenataj en la stadioj
de l' ascendo por tiuj, kiuj provas vojaĝi al Dio, la
Ĉiopotenca, la Ĉiam-Pardonanta*

JE LA NOMO DE DIO,
LA BONKORA, LA KOMPATEMA!

Laŭdo estu al Dio, Kiu igis estadon fariĝi el nenio, 1
gravuris sur la tabelon de l' homo iom el la misteroj
de Sia eterneco, instruis al li el la provizejo de dia
eldirado kion li ne sciis, igis lin klara libro por tiuj
kredantaj kaj submetintaj sian animon, vidigis al li en
ĉi tiu malluma kaj ruiniga epoko novan kreaĵon ene
de ĉiuj aferoj, kaj igis lin paroli el la plej interna koro
de l' eterneco kaj per nova kaj mirinda voĉo enkorpi-
gita en la plej perfekta Templo.⁵ Kaj ĉio tiucele: Ke ĉiu
homo atestu, en si mem kaj per si mem, antaŭ la
Sidejo de la revelacio de sia Sinjoro, ke ne estas alia
Dio krom Li, kaj ke ĉiuj atingu tiun pinton de l' realoj
kie neniu kontemplos ion ajn krom ke li perceptos
Dion en ĝi. Jen videblas la splendoj deponitaj en la

realoj de ĉiuj aferoj; ĉar alimaniere Li, supera estu Lia gloro, estas plene sanktigita super esti vidata aŭ atestata: »Neniu vidado kapablas Lin kapti, sed Li kaptas ĉiun vidadon. Estas Li la Subtila, la Ĉion-Perceptanta.«⁶

2 Kaj Mi laŭdas kaj gloras tiun Pramaron, kiu branĉiĝis el la oceano de la nevidita Esenco, kaj tiun Pramatenon, kiu aŭroris sur la horizonto de l' Unikeco, kaj tiun Prasunon, kiu leviĝis en la ĉielo de eterna splendo, kaj tiun Prafajron, kiu estis ekflamigita de la Lampo de l' eterneco ene de la Niĉo de l' unueco: Li, Kiu nomiĝas »Aḥmad« en la reĝlando de la superaj kaj »Muḥammad« inter la kunularo de la favoritaj kaj »Maḥmúd« en la regno de la sinceraj;⁷ kaj en la koroj de la sciantoj, »al kiu ajn nomo vi alvokas, al Li apartenas la plej belaj nomoj.«⁸ Kaj al Lia idaro kaj Liaj kunuloj estu abunda, firma kaj eterna paco!

3 Por daŭrigi: Aŭskultis Mi la kanton de la najtingalo de l' sciado sur la branĉoj de la arbo de via plej interna estaĵo kaj la kveradon de la kolombo de l' certeco sur la branĉoj de la laŭbo de via koro. Ŝajnas al Mi, ke Mi enspiris la bonodoron de pureco el la vesto de via amo kaj, studante vian leteron, vere troviĝis en via ĉeesto. Ja notis Mi viajn aludojn al via morto en Dio kaj via vivo pere de Li kaj la amon, kiun vi sentas por la amatoj de la Sinjoro kaj por la Manifestiĝoj de Liaj nomoj kaj la Elmontrantoj de Liaj

atributoj. Tial, do, intencas Mi konatigi vin kun sanktaj kaj brilaj signoj de la regnoj de l' forto kaj gloro, por ke eble ili povu tiri vin al la kortego de l' sankteco, proksimeco kaj beleco, kaj allogi vin al stadio, en kiu vi vidos en la tuta ekzistado nenion krom la sankta Vizaĝo de via Amato kaj konsideros la tutan kreaĵaron kiel tagon en kiu neniu indas esti menciata.⁹

Pro tio ĉi kantis la najtingalo de l' unueco en la ĝardeno de sia mistika traktaĵo,¹⁰ dirante: »Kaj aperos sur la tabelo de via koro surskribo de la subtilaj misteroj de la verso ›Timu vi Dion; Dio vin instruos‹, kaj la birdo de via spirito rememoros la sanktejojn de praa splendo kaj sur la flugiloj de l' sopiro soros en la ĉielon de la ordono ›sekvu la vojon de via Sinjoro‹ kaj prenu de la selektitaj fruktoj de l' komunio en la ĝardenoj de la diraĵo ›poste manĝu el ĉiuj fruktoj.«¹¹

Je Mia vivo, ho amiko! Se gustumus vi la fruktojn de ĉi tiuj verdaj arboj, kiuj kreskas – post kiam la radiantaj lumoj de Lia Esenco reflektiĝis en la Speguloj de Liaj nomoj kaj atributoj – el la grundo de l' vera kompreno, la sopiro forkaptus el viaj manoj la bridajn de l' pacienco kaj sindeteno kaj per la splendoj de Lia lumo incitus vian spiriton al ekscitiĝo. Ĝi vin fortirus de ĉi tiu restadejo de l' polvo al via vera kaj ĉiela loĝejo en la plej interna koro de l' mistika scio kaj levus vin al stadio, en kiu soros vi tra la aero samkiel paŝas vi sur la grundo kaj iros vi sur la akvo samkiel

BAHÁ'U'LLÁH

moviĝas vi sur la tero. Tial ĝi ĝojigu min kaj vin kaj ĉiun ajn, kiu leviĝas en la ĉielon de l' scio kaj kies koro estas revivigita pere de la brizoj de l' certeco, kiuj zefiras de la Ŝeba de la Ĉio-Indulga sur la kampo de lia interna estaĵo. Paco estu kun tiu, kiu sekvas la vojon de l' gvidado!¹²

- 6 Kaj plu: La stadioj, kiuj markas la itineron de tiu vojaĝanta de sia restadejo mortema al la hejmo ĉiela, laŭdire estas sep. Iuj nomis ilin sep valoj kaj aliaj sep urboj.¹³ Kaj estas dirite, ke neniam la vojaĝanto atingos la oceanon de l' proksimeco kaj reunuiĝo nek gustos la senkomparan vinon antaŭ ol li rezignas pri sia memo kaj trapasas ĉi tiujn stadiojn.
- 7 La unua estas la **VALO DE L' SERĈADO**. La veturilo de tiu ĉi valo estas pacienco; sen pacienco la ĉi-voja vojaĝanto nenien venos kaj neniun celon atingos. Kaj neniam li malkuraĝiĝu: se strebadus li centmilon da jaroj kaj tamen malsukcesus ekvidi la belecon de la Amiko, li ne ŝanceliĝu. Ĉar tiuj serĉantaj la Kaabon de l' »por Ni« ĝoju pro la sciigo »Laŭ Niaj vojoj certe Ni gvidos ilin.«¹⁴ En sia serĉado ili firme zonis la lumbojn de l' servado kaj en ĉiu momento vojaĝas de la ejo de l' malatento al la regno de l' serĉado. Neniu kateno ilin malhelpos kaj neniu konsilo ilin retenos.
- 8 Nepre devas ĉi tiuj servantoj purigi la koron, kiu estas la fonto de diaj trezoroj, de ĉia marko, devas sin

forturni de imitado, kio estas sekvi la spurojn de siaj prapatroj, kaj devas fermi la pordon de l' amikeco kaj malamikeco antaŭ ĉiuj homoj de la tero.

Dum ĉi tiu vojaĝo atingas la serĉanto stadion, en kiu li vidas ĉiujn kreitajn aferojn konfuzite vagantajn serĉe al la Amiko. Kiom da Jakoboj vidos li serĉantaj sian Jozefon, kiom da amantoj observos li hastantaj al la Mult-Amato; mondon de adorantaj animoj atestos li spuri la padon de la Adorato! Ĉiumomente trovas li gravan aferon, ĉiuhore konstatas li novan misteron; ĉar sian koron li malligis de ambaŭ mondoj kaj direktiĝis li al la Kaabo de la Amato. Je ĉiu paŝo atendos lin helpo el la nevidebla Regno kaj kreskos la fervoro de lia serĉado. 9

Oni devas prijuĝi la serĉadon laŭ la normo de la Maĵnun de l' amo.¹⁵ Estas rakontite, ke iun tagon oni vidis kiel Maĵnun kun fluantaj larmoj kribris la polvon. Oni lin demandis: »Kion vi faras?« Li diris: »Mi serĉas Lejli-on.« »Ve al vi!«, ekkriis ili, »Lejli ja estas de pura spirito, tamen vi en la polvo ŝin serĉas!« Li diris: »Mi ĉie ajn ŝin serĉas, ke ie eble mi ŝin trovos.« 10

Jes do, kvankam estas hontinde por saĝuloj serĉi la Sinjoron de la Sinjoroj en la polvo, ĉi tio ja indikas kiel intense la serĉado ardas. »Kiu ion serĉas kaj kun fervoro persistas, tiu ĝin trovos.«¹⁶ 11

BAHÁ'U'LLÁH

- 12 La vera serĉanto ĉasas nenion ol la celon de sia serĉado, kaj la sincera amanto havas nenian deziron ol reunuiĝon kun sia amato. Nek atingos la serĉanto sian celon krom se li oferas ĉion, tio estas, ĉion ajn kion li vidis kaj aŭdis kaj komprenis – pri ĉio devas li rezigni per la »estas neniŭ Dio«, por ke eniru li la regnon de la spirito, kiu estas la urbo de la »krom Dio«.¹⁷ Penado necesas, se ni volas serĉi Lin; ardo necesas, se ni volas trinki la nektaron de l' reunuiĝo kun Li; kaj se ni gustumos el ĉi tiu kaliko, forĵetos ni la mondon.
- 13 Dum ĉi tiu vojaĝo loĝas la vojaĝanto en ĉiu loĝloko, kiel ajn humila, kaj rezidas en ĉiu lando. En ĉiu vizaĝo serĉas li la belecon de la Amiko; en ĉiu regiono serĉas li la Amaton. Aniĝas li al ĉiu kompanaro kaj serĉas kunecon kun ĉiu animo, por ke eble en iu koro perceptas li la sekreton de la Amato aŭ en iu vizaĝo ekvidas li la belecon de la Adorato.
- 14 Kaj se, helpe de la Kreinto, dum tiu ĉi vojaĝo li trovas spuron de la senspura Amiko kaj de la ĉiela heroldo flaras la bonodoron de la longe perdita Jozefo, tuj li enpaŝos la **VALON DE L' AMO** kaj konsumiĝos en la fajro de l' amo. En tiu ĉi urbo etendiĝas la ĉielo de l' ravo kaj brilas la mondiluminanta suno de l' sopiro kaj estas bruligita la fajro de l' amo; kaj kiam estas bruligita la fajro de l' amo forbruligas ĝi al cindroj la rikolton de l' racio.

Nun la vojaĝanto forgesas sin mem kaj ĉion krom si 15
mem. Vidas li nek stultecon nek klerecon, nek dubon
nek certecon; li ne distingas la matenon de l' gvidado
de la nokto de l' eraro. Fuĝas li de kaj malkredo kaj
kredo, kaj savon por sia koro trovas li en mortiga
veneno. Tial diras 'Aṭṭár:

Por la malfidela: eraro – por la fidela: kredo;

Por la koro de 'Aṭṭár: atomo de via doloro.

La veturilo de ĉi tiu valo estas doloro, kaj se ne 16
estas doloro neniam finiĝos ĉi tiu vojaĝo. Ĉi-regione
pensas la amanto pri nenio krom la Amato kaj ne
serĉas rifuĝon krom ĉe la Amiko. Ĉiumomente centon
da vivoj li oferas survoje al la Amato, ĉiupaŝe milon da
kapoj li ĵetas al Ties piedoj.

Ho Mia frato! Ĝis kiam eniros vi la Egiptujon de 17
l' amo, neniam ekvidos vi la Jozefo-similan belecon de
la Amiko; kaj ĝis kiam, kiel Jakobo, rezignos vi pri viaj
okuloj eksteraj, neniam malfermiĝos la okulo de via
interno; kaj ĝis kiam brulos vi per la fajro de l' amo,
neniam troviĝos vi en la brakumo de l' vera sopiro.

Amanto nenion timas kaj ne povas io damaĝon al li 18
fari: En la fajro vi lin trovos frida kaj seka en la maro.

Amanto estas kiu fridas en fajro infera;

Scianto estas kiu sekas en la ocean.¹⁸

Amo ekziston ne akceptas kaj vivon ne deziras: Ĝi 19
en morto vidas vivon kaj en honto serĉas gloron. Por

BAHÁ'U'LLÁH

meriti la frenezon de l' amo devas oni profunde sani; por meriti la katenojn de la Amiko, devas oni spirite liberi. Benita la kolo kaptita en Lia maŝo kaj feliĉa la kapo falinta en la polvon sur la pado de Lia amo. Tial, ho amiko, rezignu pri vi mem, por ke trovi vi la Senkomparan; kaj soru vi trans ĉi tiun mondon morteman, por ke vian neston vi trovi en la hejmo ĉiela. Neniigu se vi deziras bruligi la fajron de l' esto kaj taŭgi por la pado de l' amo.

Neniam amo permesos al vivanta animo ĝian
vojon treti;

Neniam la falko degnos ion senvivan predi.¹⁹

20 Amo ĉiumomente forbruligas mondon kaj dezerigas ĉiun landon en kiu sian standardon ĝi starigas. Estado ne povas ekzisti en ĝia reĝejo; saĝuloj ne havas komandon en ĝia regno. La leviatano de l' amo glutas la majstron de l' racio kaj buĉas la lordon de l' scio. Trinkas ĝi la sep marojn, sed ankoraŭ ne estas satigita la soifo de ĝia koro demandanta: »Ĉu estas ankoraŭ pli da?«²⁰ Ĝi sian propran memon deskuas kaj retiriĝas for de ĉiuj sur la tero.

Estas amo surtere kaj enĉiele fremdul';

Estas en li frenezoj sepdek kaj du.²¹

21 Amo katene ligas miriadon da viktimoj kaj bore trasagas miriadon da saĝuloj. Sciu, ke ĉia ruĝo, kiun vi vidas en la mondo, ŝuldiĝas al ĝia kolero, kaj ĉiu palo sur homaj vangoj ŝuldiĝas al ĝia veneno. Ĝi ne donas

alian kuracilon ol la morton kaj moviĝas nenie krom en la valo de l' estingo; tamen, sur la lipoj de la amanto estas ĝia veneno pli dolĉa ol mielo kaj por la serĉanto estas ĝia mortiga pikilo pli kara ol centmilo da vivoj.

Tial endas forbruligi la vualojn de l' satana memo en la fajro de l' amo, por ke la spirito estu purigita kaj rafinita kaj tiel kapablas estimi la rangon de Li, por Kiu sola estas kreita la mondo.²²

Bruligu la fajron de l' amo kaj ĉion cindrigu;

Poste en la landon de l' amantoj prete enpaŝu.²³

Kaj se, konfirmita de la Kreinto, eskapas la amanto el la krifoj de la aglo de l' amo, eniros li la **REGNON DE L' SCIO**, transiros de dubo al certeco kaj direktiĝos el la mallumo de kapricaj deziroj al la gvida lumo de l' timo de Dio. Malfermiĝos lia interna okulo kaj incite konversos li kun sia Amato; malŝlosos li la pordojn de l' vero kaj adoro kaj fermos tiujn de vanaj vantoj. En ĉi tiu regno kontentigas lin la dia dekreto, estas milito por li paco kaj trovas li en la morto la signifon de eterna vivo. Kun kaj la internaj kaj la eksteraj okuloj atestas li la misterojn de l' resurekto en la regnoj de la kreitaĵoj kaj en la animoj de la homoj, kaj kun koro spirita kaptas li la saĝon de Dio en Liaj senfinaj manifestiĝoj. En la maro trovas li guton, en guto ekvidas li la sekretojn

de la maro.

Splitu la koron de l' atomo, kaj jen!

Ene de ĝi trovos vi sunon.²⁴

24 Rigardante kun la okulo de absoluta kompreno la ĉi-vala vojaĝanto vidas en la kreaĵaro de Dio nek kontraŭdirojn nek ion nekongruan kaj en ĉiu momento ekkrias li: »Vi ne povas vidi en tio kreita de la Donema iun ajn mankon. Turnu do ĉien ajn vian rigardon: ĉu vi vidas iun ajn mankon?«²⁵ Li trovas justecon en maljusteco kaj en justeco gracon. En nescio li trovas multajn kaŝitajn sciojn kaj en scio manifestiĝon de miriada da saĝoj. Rompas li la kaĝon de la korpo kaj la tenajlon de la pasioj kaj rilatas li kun la loĝantoj de l' regno senmorta. Supreniras li la eskalojn de interna vero kaj rapidas al la ĉielo de internaj signifoj. Navigas li sur la arkeo de la »baldaŭ Ni montros Niajn signojn en ĉiuj regionoj kaj en ili mem« kaj velas sur la maro de la »ĝis klariĝos por ili, ke ĝi estas la vero«.²⁶ Kaj se renkontas li maljustecon havos li paciencon, kaj se trafos lin kolero elmontros li amon.

25 Iam estis amanto, tiel oni rakontas, kiu dum longaj jaroj suspiris pro disiĝo de sia amatino kaj konsumiĝis en la fajro de l' foro. Pro la intenso de la amo lia brusto seniĝis de pacienco kaj lia korpo laciĝis de lia spirito; la vivon sen ŝi konsideris li moko kaj la

mondo lin forkonsumis. Kiome multis la tagoj dum kiuj trovis li nenian ripozon de sia sopiro; kiome multis la noktoj dum kiuj la suferado pro ŝi restigis lin sen dormo. Lia korpo iĝis nenio krom suspiro kaj la vundo de lia koro faris el li krion de malĝojo. Milon da vivoj volonte donintus li por unusola gluto el la taso de ŝia ĉeesto, sed eĉ tio por li ne atingeblis. La kuracistoj sciis neniun kuracon por li kaj kunuloj evitis lian kompanion; ho jes, kuracistoj ne havas medikamenton por iu malsana pro amo. Nur la favoro de la amatino povas lin resanigi.

Finfine donis la arbo de lia sopiro la frukton de l' despero kaj cindriĝis la fajro de lia espero. Tiam iunokte li ne plu povis elteni la vivon kaj forlasis sian domon voje al la bazaro. Subite gardisto lin sekvis. Ekkuris li kun la gardisto rapide lin sekvanta; tiam kuniĝis aliaj gardistoj kaj al la elĉerpito baris ĉiun pasejon. Kaj tiu mizerulo kriis el sia koro kaj kuris tien kaj reen kaj ĝemis al si mem: »Certe ĉi tiu gardisto estas 'Izrá'íl, mia mortanĝelo tiel rapide min postkuranta, aŭ estas li tirana ulo instigita de hato kaj malico.« Liaj piedoj portis lin plu – tiun malfeliĉulon sangantan pro la sago de l' amo – dum lamentis lia koro. Kaj jen venis li al la muro de ĝardeno kaj ĝin grimpis per nedirebla doloro kaj peno. Li ekvidis ke estas ĝi tre alta; sed tamen, forgesante sian vivon, li sin ĵetis en la ĝardenon.

BAHÁ'U'LLÁH

- 27 Kaj tie ekvidis li sian amatinon, kiu kun lampo en la mano estis serĉanta ringon perditan. Kiam la korpremita amanto alrigardis sian ravan amatinon profunde suspiris li kaj levis la manojn al preĝo vokante: »Ho Dio! Al la gardisto donu honoron kaj riĉon kaj longan vivon. Ĉar estis la gardisto Gabrielo gvidanta ĉi tiun kompatindulon; aŭ estis li Isráfíl alportanta vivon al ĉi tiu mizerulo!«
- 28 Efektive, ĝustis liaj vortoj; ĉar estis li trovinta multajn kaŝitajn justecojn en tiu ŝajna tiraneco de la gardisto, kaj estis li vidinta kiom da beno kaŝiĝis malantaŭ la vualo. Per unusola kolera bato estis la gardisto kuniginta tiun, kiu soifis en la dezerto de l' amo, kun la maro de la amatino kaj estis dispelinta la mallumon de la disiĝo per la brilanta lumo de la reunuiĝo. Estis li gvidinta iun el la foro al la ĝardeno de la proksimeco kaj malsanan animon al la kuracanto de la koro.
- 29 Do, se la amanto povintus anticipi la finon estus li de la komenco beninta la gardiston, estus lianome preĝinta al Dio kaj ties tiranecon konsiderinta justeco; sed ĉar al li la fino estis vualita, lamentis kaj plendis li en la komenco. Tamen, tiuj vojaĝantaj en la ĝardeno lando de vera scio vidas pacon en milito kaj konkordon en malamikeco, ĉar vidas ili la finon en la komenco.

Tia estas la stato de la vojaĝantoj en ĉi tiu valo, sed 30
la homoj de la valoj super ĉi tiu konsideras la finon
kaj la komencon kiel unu. Ne! Vidas ili nek »kom-
encon« nek »finon« kaj atestas nek »unuan« nek
»lastan«. Ne! La loĝantoj de la urbo de l' senmorteco,
kiuj loĝas en la ĉiela ĝardeno, pli ĝuste eĉ ne vidas
»nek unuan nek lastan«: fuĝas ili de ĉio, kio estas
unua, kaj rifuzas ili ĉion, kio estas lasta. Ĉar ĉi tiuj
transpasis la mondojn de l' nomoj kaj, rapide kiel la
fulmo, fuĝis trans la mondojn de l' atributoj. Tiel oni
diras: »La perfekteco de la kredo je la Dia Unueco
estas nei al Li ajnajn atributojn.«²⁷ Kaj ekloĝis ili en la
ombro de la Dia Esenco.

Tial Khájih 'Abdul'Iláh²⁸ – Dio la Plej Alta sanktigu 31
lian benitan animon – ĉi-rilate menciis subtilan punk-
ton kaj diris elokventan vorton pri la signifo de
»Gvidu nin sur la rektan vojon«,²⁹ kio estas: »Montru
al ni la ĝustan vojon, tio estas, honoru nin per la amo
al Via Esenco por ke ni liberiĝu de okupiĝo pri ni mem
kaj ĉio krom Vi kaj fariĝu tute Via, ke ni sciu nur Vin
kaj vidu nur Vin kaj pensu pri neniu krom Vi.«

Ne! Soras ili eĉ super ĉi stadion, kiel estas dirite: 32
»Amo estas vualo inter la amanto kaj amato.« »Pli ol
tion ĉi mi ne rajtas diri.«

Je ĉi tiu horo aŭroris la mateno de vera scio kaj 33
estingiĝis la lampoj de vojaĝado kaj vagado.

Vualita de ĉi tio ankaŭ estis Moseo,
 Malgraŭ Sia virto kaj Sia lumo.
 Tial vi, al kiu tute mankas flugiloj,
 Rezignu pri ĉia espero de flugado!³⁰

34 Se estas vi homo de komunio kaj preĝo, soru per la flugiloj de l' helpo de la sanktuloj, por ke vidu vi la misterojn de la Amiko kaj atingu la lumojn de la Amato: »Vere, ni apartenas al Alaho kaj vere ni revenos al Li.«³¹

35 Pasinte tra la Valo de l' Scio, kiu estas la lasta stadio limigita, venas la vojaĝanto al la **UNUA STADIO DE L' UNUECO** kaj trinkas el la pokalo de l' ununureco kaj ekvidas la manifestiĝojn de l' unusoleco. En ĉi tiu stadio disŝiras li la vualojn de l' plureco, fuĝas el la regnoj de l' karno kaj ascendas en la ĉielon de l' unueco. Aŭdas li per la orelo de Dio; ekvidas li per la okulo de Dio la misterojn de dia kreado. Paŝas li en la internan sanktejon de la Amiko kaj, kiel intimulo, kunloĝas en la pavilono de la Multamata. Etendas li la manon de l' vero el la maniko de la Absoluta kaj rivelas la misterojn de dia potenco. Vidas li en si mem nek nomon nek famon nek rangon, sed trovas en la laŭdado de Dio sian propran laŭdon kaj en la nomo de Dio sian propran. Al li »ĉiuj kantoj estas de tiu suverena Reĝo« kaj ĉiu melodio de Li. Sidas li sur la trono de la »Ĉio venas de Alaho!«³² kaj ripozas sur la benko de la »Ne estas potenco nek forto sed sole en Alaho.«³³ Rigardas li ĉiujn aferojn per la okulo de

l' Unueco kaj vidas la brilajn radiojn de la Suno de l' Vero hele lumantaj de la tagiĝejo de la Dia Esenco sur ĉiujn kreitaĵojn same, kaj observas kiel la lumoj de l' Unueco reflektiĝas de ĉio kreita.

Scias via moŝto, ke ĉiuj variaĵoj, kiujn tra la stadioj de sia vojaĝado vidas la vojaĝanto en la regnoj de l' estado, rezultas el lia propra vido. Ni donas ekzemplon pri tio, por ke plene klariĝas la signifo. Konsideru la videblan sunon: Kvankam lumas ĝi kun la sama brileco sur ĉio ekzistanta kaj laŭ la ordono de la Sinjoro de l' Revelaciado donas lumon al ĉiuj aferoj, ĝi tamen en ĉiu loko manifestiĝas kaj malavaras laŭ la ivoj de tiu loko. Ekzemple, en spegulo reflektiĝas ĝia propra disko kaj formo kaj tio ĉi okazas pro la klareco de la spegulo mem; tra kristalo aperigas ĝi fajron; kaj je aliaj aĵoj montras ĝi nur la efikon de sia brulado, sed ne sian plenan diskon. Kaj tamen, pere de tiu efiko ĝi, pro la ordono de la Kreinto, trejnas ĉiun aĵon laŭ ĝia kapablo, ĝuste kiel vi tion observas. 36

Simile videbliĝas koloroj en ĉiu objekto laŭ ĝia naturo. Ekzemple en flava vitro la radioj brilas flave; en blanka vitro ili estas blankaj; kaj en ruĝa vitro videblas ruĝaj radioj. Ĉi tiuj variaĵoj rezultas de la objekto mem, ne de la lumo. Kaj se ejo estos forfermita de la lumo, kiel pere de muroj kaj tegmento, estos ĝi tute senigita de la lumo kaj radioj de la suno. 37

38 Tiel iuj malfortaj animoj enfermis la larĝan etend-
iĝon de l' scio ene de la muroj de memo kaj pasio kaj
sub la mantelo de l' nescio kaj blindeco kaj tiel vualis
for de si la lumon de la mistika Suno kaj la misterojn
de la eterna Amato. Erarvagadis ili malproksime de la
gemsimila saĝo de la splenda Kredo de la Sinjoro de
l' Mesaĝistoj,³⁴ estis ekskluditaj el la interna kortumo
de la Ĉiabeleca, kaj estis forpelitaj de la Kaabo de
l' gloro. Tia estas la valoro de la homoj de ĉi tiu epoko!

39 Kaj se najtingalo soras preter la argilo de l' memo
kaj nestas en la rozolaŭbo de l' koro kaj per arabaj
melodioj kaj dolĉaj persaj tonoj rakontas la misterojn
de Dio – de kio unusola vorto revivigas ĉiun sen-
vivaĵon kaj dotas per la spirito de sankteco ĉiun
putrantan oston – konstatos vi kiel milo da ungegoj
de l' envio kaj miriado da krifoj de l' hato Lin post-
ĉasas kaj kun tuta sia potenco klopodas Lin mortigi.

40 Jes, por skarabo ŝajnas dolĉa bonodoro esti stinka,
kaj la malsanulon kun kataro ne impresos plaĉa par-
fumo. Tial estas, kiel gvido por la nesciantoj, dirite:

Vi la kapon vian de l' kataro purigu

Kaj anstataŭe la spiron de Dio enspiru.³⁵

41 Do, la diferencoj inter objektoj estas nun klarigitaj.
Tiel vidas la vojaĝanto, kiam li rigardas nur al la loko
de la aspekto – tio estas, kiam li konsideras nur la
vitron –, flavon kaj ruĝon kaj blankon. Kaj tiel okazis,

ke inter la homoj regas konfliktado kaj sterniĝis malhela polvo de limigitaj animoj super la mondo. Aliaj rigardas al la radiado de la lumo, dum ankoraŭ aliaj trinkis de la vino de l' unueco kaj vidas nenion krom la suno mem.

Dum trapasas la vojaĝantoj ĉi tiujn tri malsamajn nivelojn, konforme malsamas ilia kompreno kaj iliaj vortoj, kaj tial surtere daŭre montriĝis la signo de l' konflikto. Ĉar estas iuj, kiuj loĝas sur la nivelo de Dia Unueco kaj parolas pri tiu mondo, kaj iuj loĝas en la regnoj de la limigiteco, kaj iuj sur la ŝtupoj de la memo, dum aliaj estas tute vualitaj. Tiel la iutempaj sensciuloj, kiuj neniel partoprenas la briladon de la dia Beleco, faras certajn pretendojn kaj, dum ĉiu epoko kaj ciklo, igas la homojn de l' oceano de Dia Unueco suferi kion ili mem meritas. »Se Alaho volus puni la homojn pro ilia malbonfaro, Li ne lasus sur la tero estaĵon vivantan. Li tamen konsentas al ili prokraston ĝis fiksita tempo.«³⁶

Ho Mia frato! Pura koro estas kiel spegulo; purigu ĝin per la polurilo de l' amo kaj fortranĉiĝo de ĉio krom Dio, por ke brilu en ĝi la vera suno kaj aŭroru la eterna mateno. Tiam klare komprenos vi la signifon de: »Tero kaj ĉielo ne povas Min enteni; kio sola kapablas Min enteni estas la koro de tiu, kiu kredas je Mi.«³⁷ Kaj vi prenos vian vivon en vian manon kaj per

senlima sopiro ĝin elmetos antaŭ via ĵus trovita Amato.

44 Kiam ajn la lumo de la revelacio de la Reĝo de l' Unueco lokiĝas sur la trono de l' koro kaj animo videbliĝas Lia brilado en ĉiu membro kaj korpoparto. Tiam el la mallumo glimos la mistero de la fama tradicio: »Servanto preĝante proksimiĝas al Mi ĝis kiam Mi respondos al li, kaj kiam Mi respondis al li, fariĝas Mi la orelo per kiu li aŭdas ...«³⁸ Ĉar tiel la Mastro de la domo aperis en Sia hejmo kaj ĉiuj kolonoj de tiu loĝloko brilas kun Lia lumo. Kaj, ĉar la ago kaj efiko de la lumo devenas de la Lumdonanto, tial do moviĝas ĉio pere de Li kaj leviĝas pro Lia volo. Ĉi tio estas tiu fonto, el kiu trinkas la proksimuloj, kiel estas dirite: »... fonto, el kiu trinkos la elektitoj«.³⁹

45 Tamen, neniu interpretu ĉi tiujn dirojn tiel kvazaŭ ili implicus la enkarniĝon aŭ descendon de la mondoj de Dio al la niveloj de Liaj kreitaĵoj, nek ili konduku vin, eminentulon, al tiaj miskomprenoj. Ĉar Dio, en Sia Esenco, estas sanktigita super ĉia supreniro kaj malsupreniro, deiro kaj aliro; deeterne superas Li la atributojn de Sia kreaĵaro kaj ĉiam restos tia. Neniu homo iam Lin konis; neniu animo iam kapablis sondi la naturon de Lia Estaĵo. En la valo de Lia scio erarvagadas ĉiu mistikulo; je la provo kompreni Lian Esencon konsterniĝas ĉiu sanktulo. Estas Li sanktigita

super la kompreno de la saĝuloj; superas Li la scion de la sciantoj! »La vojo estas barita kaj ĉia serĉado malakceptita. Lia pruvo estas Liaj signoj, Lia evidenteco Lia esto.«⁴⁰

Tial diris la amantoj de la vizaĝo de l' Amato: »Ho Vi, Kies Esenco sola povas konduki al Lia Esenco kaj Kiu transcendas ĉian similecon kun Siaj kreitaĵoj.«⁴¹ Kiel kapablas kompleta nenieco sproni sian rajd-beston en la arenon de l' eterneco aŭ efemera ombro atingi la eternan sunon? La Amiko alparolita per la vortoj »Se ne por Vi« diris: »Ni malsukcesis koni Vin«; kaj la Amato aludita per la vortoj »aŭ eĉ pli proksima« diris: »nek atingis Vian ĉeeston.«⁴²

Efektive, la aludoj faritaj al la gradoj de mistika sciado rilatas al la scio pri la radiado de tiu Suno de l' Vero kiel reflektiĝas ĝi en diversaj speguloj. Kaj la radiado de tiu lumo enestas la korojn, sed ja estas ĝi kaŝita sub la vualoj de egoaj deziroj kaj profanaj ligiĝoj – same kiel kandelo ene de fera lanterno; nur kiam la kovrilo estas levita disbrilas la lumo de la kandelo.

Sammaniere manifestiĝos, kiam vi forŝiros la vualojn de l' iluzio de la surfaco de via koro, la lumoj de l' Unueco.

Estas do klare, ke eĉ ĉi tiuj radioj ne rezultas el deiro aŭ aliro – des malpli tiu Esenco de l' ekzistado

kaj sopirata Mistero. Ho Mia frato, konsideru ĉi tiujn aferojn per sinteno de enketado, ne de blinda imitado. Veran vojaĝanton ne malhelpas la limigiteco de vortoj, nek timigas la ŝancelado de insinuoj.

Kiel povas kurteno separi la amanton de sia amato,
Kiam ne povas eĉ la muro de Aleksandro ilin apartigi?⁴³

50 Multas sekretoj kaj miriadas fremduloj. Volumoj ne sufiĉos por enteni la misteron de la Amato, nek kapablas ĉi tiuj paĝoj ĝin elĉerpi, kvankam estas ĝi ne pli ol vorto, ne pli ol signo. »Scio estas unusola punkto, kiun multobligis la malsaĝuloj.«⁴⁴

51 Konjektu, do, el tio la diferencojn inter la mondoj. Kvankam senfinas la mondoj de Dio, iuj tamen nomas da ili kvar: la mondon de l' tempo, kiu havas kaj komencon kaj finon; la mondon de l' daŭro, kiu ja havas komencon, sed kies fino ne estas evidenta; la mondon de l' praa realo, kies komenco ne videblas sed kiu kiel sciante ja havas finon; kaj la mondon de l' eterneco, de kiu videblas nek la komenco nek la fino. Kvankam multas diversaj deklaroj pri ĉi tiuj punktoj, estus tamen lacige priskribi ilin detale. Tiel diris iuj, ke la mondo de l' praa realo havas nek komencon nek finon kaj identigis la mondon de l' eterneco kun la nevidebla, nealirebla kaj nekonebla Esenco. Aliaj nomis tiujn la mondoj de la Ĉiela

Kortego, de la Transcenda Regado, de la Dia Regno kaj de Mortema Ekzisto.

Plie, da padoj de l' amo estas nomataj kvar: de la kreitaĵoj al la Verulo, de la Verulo al la kreitaĵoj, de la kreitaĵoj al la kreitaĵoj, kaj de la Verulo al la Verulo. 52

Estas multaj diroj de saĝuloj kaj mistikuloj de iamaj tempoj, kiujn Mi ĉi tie ne menciis, ĉar ne plaĉas al Mi abunda citado de diroj el la pasinteco, ĉar citi la vortojn de aliaj indikas akiritan kleron kaj ne dian doton. Tiel do la multeco de Mia citado tie ĉi ŝuldiĝas al la deziroj de la homoj kaj la kutimoj de la kleruloj. Krome transpasas tiaj aferoj tion traktatan en ĉi tiu epistolo. Mia malemo redoni iliajn dirojn ne rezultas el fiero; sed estas ĝi la manifestiĝo de saĝo kaj elmontras malavaron. 53

Se detruis Khiḍr la ŝipon sur la maro,
kaŝiĝas mil ĝustoj en tiu ĉi maljusto.⁴⁵

Krome konsideras Sin ĉi tiu Servanto komplete perdita kaj neekzistanta, eĉ antaŭ unu el la amatoj de Dio, kiom pli en la ĉeesto de Liaj sanktuloj. Glorata estu mia Sinjoro, la Plej Alta! Plie estas nia celo elmontri la stadiojn sur la vojo de la vojaĝanto, kaj ne prezenti la konfliktantajn eldirojn de la mistikuloj. 54

Kvankam estas donita konciza ekzemplo pri la komenco kaj fino de la relativa kaj materia mondo, estas nun tamen prezentata plia ilustraĵo, por ke 55

klariĝu la plena signifo. Ekzemple, konsideru vi, eminentulo, vian propran memon: Ekzistas vi unue rilate al via filo kaj laste rilate al via patro. En via ekstera apero prezentas vi la aspekton de potenco en la regnoj de dia kreado; en via interna estado rivelas vi la kaŝitajn misterojn, kiuj estas la dia konfidaĵo deponita en vi. Kaj tiel unua-eco kaj lasta-eco, ekstereco kaj interneco veras ĉiuj, en la senco menciita, rilate al vi mem, tiel ke pere de ĉi tiuj kvar statoj donitaj al vi povas vi kompreni la kvar diajn statojn, kaj ke povas la najtingalo de via koro kantanta sur ĉiuj florantaj branĉoj de la arbo de l' ekzisto, ĉu vidita aŭ nevidita, elvoki: »Li estas la Unua kaj la Lasta, la Videbla kaj la Kaŝita!«⁴⁶

- 56 Ĉi tiuj deklaroj estas faritaj en la sfero de tio relativa. Alie: tiuj animoj, kiuj per ununura paŝo trairis la mondon relativan kaj kondiĉitan kaj loĝas en la korto de sendependa suvereneco kaj starigis sian tendon en la regnoj de absoluta aŭtoritato kaj kontrolo, per ununura fajrero forbruligis ĉi tiujn relativecojn kaj per nura rosguto forviŝis ĉi tiujn vortojn. Naĝas ili en la maro de l' spirito kaj soras tra la sankta sfero de l' lumo. Kian ekzistadon do havas vortoj sur tia nivelo, ke estu menciataj aŭ priskribataj »unua« kaj »lasta« aŭ iuj krom ĉi tiuj? Estas en ĉi tiu regno la unua la sama kiel la lasta kaj la lasta la sama kiel la unua.

En via animo el amo fajron estigu
Kaj ĉiujn pensojn kaj vortojn forbruligu.⁴⁷

Ho mia amiko, rigardu vin mem: Se ne fariĝintus vi 57
patro kaj generintus filon, vi ne komprenus ĉi tiujn
vortojn. Nun forgesu ilin unu kaj ĉiujn, por ke lernu vi
de la Mastro de l' Amo en la lernejo de Dia Unueco,
revenu al Dio, rezignu pri la lando de nerealeco favore
al via vera rango kaj loĝu sub la ombro de la arbo de
l' scio.

Ho vi karulo! Povriĝu, ke eniru vi la superan korton 58
de l' riĉoj; kaj humiligu vian korpon, ke trinku vi el la
torento de l' gloro kaj kaptu la plenan signifon de la
poemoj pri kiuj demandis vi.

Tiel estas evidentigite, ke ĉi tiuj statoj dependas de 59
kion atingas la vojaĝanto. En ĉiu urbo vidos li mon-
don, en ĉiu valo atingos printempon, sur ĉiu herbejo
aŭdos kanton. Sed la falko de la mistika ĉielo tenas en
sia brusto multajn mirindajn karolojn de l' spirito, kaj
la persa birdo tenas en sia animo multajn dolĉajn
melodiojn arabajn; tiuj ĉi tamen estas kaŝitaj kaj
restos kaŝitaj.

Se parolos Mi, frakasiĝos multaj mensoj,
Kaj se skribos Mi, rompiĝos multaj plumoj.⁴⁸

Paco estu al li, kiu plenumas ĉi tiun superan 60
vojaĝon kaj per la lumoj de l' gvidado iras laŭ la vojo
de l' vero.

- 61 Trapasinte la altajn nivelojn de tiu ĉi ĉiela vojaĝo eniras la vojaĝanto la **URBON DE L' KONTENTO**. En ĉi tiu valo sentas li la brizojn de dia kontento zefirantaj de la nivelo de l' spirito. Forbruligas li la vualojn de l' bezono kaj per la okulo interna kaj ekstera perceptas ene de kaj ekstere de ĉiuj aferoj la tagon de la »Alaho faros ilin sendependaj per Sia abundeco«. ⁴⁹ De tristo turniĝas li al beato, de morno al ĝojo, kaj de angoro kaj deprimado al ekstazo kaj raviteco.
- 62 Kvankam eble en ĉi tiu valo vivas la vojaĝantoj, laŭ ekstera ŝajno, sur la polvo, ili tamen interne tronas sur la altoj de mistika signifo; frandas ili de la eternaj ĉielaj malavaroj kaj trinkas la delikatajn vinojn de l' spirito.
- 63 La lango malsukcesas priskribi ĉi tiujn tri valojn kaj la parolo fiaskas. La plumo ne kapablas ĉi tiun arenon eniri kaj la inko postlasas nur makulon. En ĉi tiuj stadioj prezentas la najtingalo de l' koro aliajn kantojn kaj sekretojn, kiuj igas la koron salti kaj la animon jubili, sed ĉi tiu mistero de interna signifo estu frustrata nur de koro al koro kaj konfidata nur de brusto al brusto.
- La beato de l' mistikuloj rakontebblas nur de koro al koro,
Estas ĝi beato, kiun neniu mesaĝisto povas teni kaj neniu misiulo kuraĝas peri.⁵⁰

Tiom da aferoj pro feblo lasis mi nediritaj;
Ĉar malsukcesus miaj vortoj ilin redoni kaj
fiaskus ĉiuj miaj klopodoj.⁵¹

Ho amiko, ĝis kiam eniris vi la ĝardenon de ĉi 64
internaj signifoj neniam gustumos vi la nepereontan
vinon de tiu ĉi valo. Kaj se vi gustumos ĝin, for-
turniĝos vi de ĉio alia kaj trinkos el la pokalo de
l' kontento; malkateniĝos vi de ĉiuj aferoj kaj vin ligos
al Li, donos vian vivon sur Lia pado kaj oferos vian
animon favore al Li. Kaj tion ĉi malgraŭ tio ke en ĉi tiu
regno ne ekzistas ia »ĉio alia« pri kio povus vi rezigni:
»Dio estis sola; ne estis iu alia krom Li.«⁵² Ĉar la
vojaĝanto sur ĉi tiu nivelo ekvidas en ĉiuj aferoj la
belecon de la Amiko. En fajro vidas li la vizaĝon de la
Amato; en iluzio vidas li la sekreton de realeco; en la
atributoj deĉifras li la enigmon de la Esenco. Ĉar estas
li per unusola suspiro forbruliginta ĉiujn vualojn kaj
per palpebrumo flankenpuŝinta ĉiujn kovraĵojn. Kun
penetra vido rigardas li la novan kreitaron kaj kun
lucida koro kaptas li subtilajn verojn. La vortoj »via
rigardo hodiaŭ estas penetranta«⁵³ sufiĉe pravas ĉi
tiun aserton kaj adekvate priskribas ĉi tiun staton.

Post esti vojaĝinta tra la niveloj de pura kontento 65
venas la vojaĝanto al la **VALO DE L' MIRO** kaj ĵetiĝas en
la oceanojn de l' grandiozo; kaj en ĉiu momento
pliiĝas lia mirado. Nun por li la enkorpiĝo de riĉeco
estas povreco mem kaj estas la esenco de sende-

pendeco kompleta malpovo. Nun estas li paralizita per la beleco de la Ĉio-Glora; denove lin tedas lia propra vivo. Kiom da mistikaj arboj ĉi tiu ciklono de l' konsterniĝo ekkaptis ĉe la radikoj, kiom da animoj ĝi elsuĉis kaj elĉerpis. Ĉar en ĉi tiu valo estas la vojaĝanto ĵetita en konfuzon, kvankam, en la okuloj de tiu ĝin atinginta, estas tiaj signoj estimataj kaj multamataj. Ĉiumomente ekvidas li miraklan mondon kaj novan kreaĵaron kaj paŝas de mirindaĵo al mirindaĵo kaj rave perdiĝas antaŭ la novfarado de Tiu, Kiu estas la suverena Sinjoro de ĉiuj.

66 Vere, ho frato, se pripensas ni ĉiun kreitaĵon, ekvidos ni miriadon da perfektaj saĝoj kaj konatiĝos kun miriado da novaj kaj mirigaj veroj. Unu el la fenomenoj kreitaj estas la sonĝo. Vidu kiom da sekretoj estas deponitaj en ĝi, kiom da saĝoj trezoritaj, kiom da mondoj kaŝitaj. Observu kiel dormas vi en loĝejo kun poroj fermitaj, sed subite troviĝas vi en fora urbo, kiun eniras vi sen movi viajn piedojn aŭ lacigi vian korpon. Sen la taksado de viaj okuloj vidas vi; sen uzi viajn orelojn aŭdas vi; sen lango parolas vi. Kaj eventuale, post kiam pasis deko da jaroj, spertos vi en ĉi tiu pasema mondo ĝuste tiujn aferojn, kiujn ĉi-nokte vi sonĝis.

67 Do, en la sonĝo estas multaj pripensindaj saĝoj, kiujn neniu krom la homoj de ĉi tiu valo povas vere kompreni. Unue, kio estas tiu mondo, kie sen okulo aŭ

orelo aŭ mano aŭ lango oni povas ĉiujn tiujn utiligi? Due, kiel povas esti ke en la ekstera mondo hodiaŭ vi vidas la efektiviĝon de songo, kiun spertis vi en la mondo de la dormo antaŭ dek jaroj? Pripensu la diferencon inter ĉi tiuj du mondoj kaj la misterojn kaŝitajn en ili, por ke, helpe de diaj konfirmoj, vi povu fari ĉielajn malkovrojn kaj eniri la regnojn de l' sankteco.

Dio, la Plej Alta, ĉi tiujn signojn metis en la homon por ke vualitaj mensoj ne negu la misterojn de la transa vivo, nek degradu tion, kio estas promesita al ili. Ĉar iuj sin tenas je la racio kaj neas ĉion ajn racie ne kompreneblan, sed ja povas feblaj mensoj neniam kompreni la realon de la stadioj pri kiuj parolis ni: sole la universala dia Intelektio kapablas ilin kompreni. 68

Kiel povas febla racio kompreni la Koranon
Aŭ la aranejo en sia reto kapti fenikson?⁵⁴

Ĉiuj tiuj statoj troveblas kaj atesteblas en la Valo de l' Miro, kie la vojaĝanto ĉiumomente serĉas pli kaj ne laciĝas. Tiel la Sinjoro de la unua kaj la lasta,⁵⁵ elmontrante la nivelojn de kontemplado kaj esprimante konsterniĝon, diris: »Kreskigu mian miron kaj raviĝon pri Vi, ho Dio!«⁵⁶ 69

Pripensu same la perfektecon de la homa kreaĵo kaj ke ĉiuj tiuj niveloj kaj statoj konserviĝas kaj 70

BAHÁ'U'LLÁH

kaŝiĝas en ĝi.

Ĉu vi konsideras vin estaĵo eta kaj febla,
Dum troviĝas ene de vi la mondo pli granda?

71 Tial do devas ni labori por detrui la animalan
kondiĉon ĝis kiam ekaperos la intencita homeco.

72 Tiel same Lukmano, kiu trinkis el la fonto de l' saĝo
kaj gustumis la akvojn de l' kompatemo, pruvante al
sia filo Natano la nivelojn de resurekto kaj morto,
prezentis la sonĝon kiel evidentajon kaj ekzemplon.
Tion Ni rakontas tie ĉi, por ke pere de ĉi tiu efemera
Servanto postrestu memoraĵo pri tiu junulo el la
lernejo de Dia Unueco, tiu pliaĝulo el la regnoj de
instruado kaj abnegacio. Diris li: »Ho filo, se kapablas
vi ne dormi, tiam kapablas vi ne morti. Kaj se
kapablas vi ne vekigi post dormo, tiam kapablas vi ne
levigi post la morto.«

73 Ho amiko, estas la koro la loĝloko de eternaj
misteroj: Ne faru ĝin la hejmo de efemeraj vantoj. Ne
disipu la trezoraĵon de via altvalora vivo okupiĝante
pri ĉi tiu rapide pasanta mondo. Venas vi el la mondo
de l' sankteco: Ne ligu vian koron al la tero. Estas vi
loĝanto en la kortego de l' reunuiĝo: Ne elektu la
hejmlandon de l' polvo.

74 Do, ne estas fino je la priskribado de ĉi tiuj statoj,
sed pro la misfaroj altruditaj de la nuntempuloj ne
emas ĉi tiu Servanto daŭrigi:

Restas la rakonto nefinita kaj netraktita;
Do, pardonu min, ĉar de laciĝo estas mi tenita.⁵⁷

Ĝemas la plumo kaj ploras la inko, kaj la rivero de 75
l' koro hulas per ondoj sangaj. »Nenio povas trafi nin
ol tio, kion Alaho dekretis por ni.«⁵⁸ Paco estu al tiu,
kiu sekvas la vojon de l' gvidado!

Post sorado al la altaj pintoj de l' miro venas la 76
vojaĝanto al la **VALO DE L' VERA POVRECO KAJ ABSOLUTA
NENIECO**. Ĉi tiu stadio estas tiu de la morto de la memo
kaj de vivado en Dio, de esti malriĉa en la memo kaj
riĉa en la Dezirato. La povreco ĉi tie menciita, signifas
esti senhava rilate al tio apartenanta al la kreita
mondo kaj riĉa je tio, kio apartenas al la regnoj de
Dio. Ĉar, kiam atingas la vera amanto kaj sindediĉa
amiko la ĉeeston de la Amato, kaŭzos la radianta
beleco de la Amato kaj la fajro de la amanta koro
incendion kaj forbruligos ĉiujn vualojn kaj envolv-
aĵojn. Ho jes, ĉio lia, de la medolo ĝis la haŭto, ek-
flamos, tiel ke restos nenio krom la Amiko.

Kiam fine elmontris li la ecojn
De Tiu, Kiu estas la praa Reĝo,
Tiam forbruligis Moseo ĉiajn menciojn
De ajna afero efemera kaj pasema.⁵⁹

Tiu, atinginta ĉi tiun staton, estas sanktigita super 77
ĉio apartenanta al la mondo. Tial ne gravas, ĉu tiuj
atingintaj la oceanon de Lia ĉeesto posedas neniujn el

la limigitaj aferoj de ĉi tiu pereema mondo, ĉu surterajn riĉaĵojn aŭ mondajn opiniojn. Ĉar tio apartenanta al Liaj kreitoj estas limigita de iliaj propraj limigoj, dum tio apartenanta al Dio estas sanktigita super tio. Ĉi tio dirita devas esti profunde pripensata por ke klariĝu ĝia intenco. »La justuloj male trinkos el kaliko, en kiu estos miksaĵo de Kamforo.«⁶⁰ Se sciigás la vera signifo de »kamforo«, evidentiĝos nia vera intenco.

78 Ĉi tiu stato estas tiu povreco pri kiu estas dirite: »Povreco estas Mia gloro.«⁶¹ Kaj interna kaj ekstera povreco havas multajn tavolojn kaj multajn signifojn, kiujn mi ne konsideris taŭgaj por ĉi tie ilin mencii; tial mi rezervis tiujn por alia okazo depende de kion Dio deziros kaj la sorto destinoj.

79 Tio ĉi estas stato en kiu por la vojaĝanto pareas la multobleco de ĉiuj aferoj, kaj leviĝas el la mallumo la dia Vizaĝo aŭroranta super la horizonto de l' eterneco, kaj manifestiĝas la signifo de »Ĉiuj aĵoj estas pasemaj, krom Li.«⁶²

80 Ho mia amiko! Aŭskultu kore kaj anime la kantojn de la spirito, kaj konsideru ilin trezoro egala al viaj propraj okuloj; ĉar ĉielaj saĝoj, kiel printempaj pluvoj, ne eterne pluvos sur la grundon de la homkoroj, kaj kvankam neniam ĉesas kaj neniam elĉerpiĝas la graco de la Ĉiopova, estas tamen al ĉiu tempo kaj ĉiu epoko certa porcio destinita kaj certa bono asignita, kiuj

estas donitaj laŭ difinita mezuro. »Nenio ekzistas, da kio Ni ne posedas trezorojn, sed Ni sendas el ĝi nur fiksitajn kvanton.«⁶³ Efektive, la nuboj de la kompatemo de la Amato pluvas nur sur la ĝardenon de l' spirito kaj donas ĉi tiun malavaron nur dum la sezono printempa. Aliaj sezonoj ne partoprenas en ĉi tiu supera graco kaj aridaj grundoj ne ricevas porcion de ĉi tiu malavara favoro.

Ho Mia frato! Ne ĉiu maro havas perlojn; ne ĉiu branĉo floras, nek kantas sur ili la najtingalo. Tial faru vi fortostreĉon antaŭ ol retiriĝas la najtingalo de la mistika Paradizo al la ĉiela ĝardeno kaj la radioj de la mateno de interna signifo revenas al la Tag-Stelo de l' Vero, por ke eble sur ĉi tiu polvostaketo, la mortema mondo, kaptos vi la bonodoron de la eterna rozĝardeno kaj vivos sub la ombro de tiuj loĝantaj en ĉi tiu eterna urbo. Kaj kiam atingis vi ĉi tiun plej altan nivelon kaj plej altan gradon, tiam ekvidos vi la Amaton kaj forgesos ĉion alian. 81

La Amiko, senvualigita, verŝas la splendon de
Sia lumo,
Ho vi dotitaj per vidkapablo, tra ĉiu pordo kaj
muro!⁶⁴

Rezignis vi pri la gutoj de l' vivo kaj proksimiĝis al la oceano de la Mult-Amato. Jen la celo, kiun serĉis vi; faru Dio, ke vi ĝin atingu. 82

83 En ĉi tiu urbo eĉ la lumvualoj forŝiriĝas kaj malaperas. »Lian belecon vualas nenio krom lumo kaj Lian vizaĝon kovras nenio krom revelacio.«⁶⁵ Kiel strange, ke la Amato estas videbla kiel la suno kaj malgraŭ tio la senatentaj ankoraŭ postĉasas brilorajŝon kaj senvaloran metalon. Ho ve! La intenseco de Lia revelacio Lin vualis kaj la pleneco de Lia brilado Lin kaŝis.

Kiel la suno tagmeza
La Verulo brile radiis,
Sed ve, ke Li venis
Al la urbo de l' blindaj!⁶⁶

84 En ĉi tiu valo pasas la vojaĝanto preter la stadioj de la »unueco de l' ekzistado« kaj la »unueco de l' aspekto« kaj atingas tiun unuecon, kiu estas sanktigita super ambaŭ tiuj stadioj.⁶⁷ Sole ekstazo povas ampleksi ĉi tiun temon, nek priskribo, nek argumentado; kaj tiu troviĝinta je ĉi tiu stadio de la vojaĝo aŭ kaptinta spiron el ĉi tiu ĝardeno, tiu scias pri kio Ni parolas.

85 Dum ĉiuj ĉi vojaĝoj la vojaĝanto ne rajtas devojiĝi eĉ nur harlarĝon de la Leĝo, ĉar tio ĉi efektive estas la sekreto de la Pado kaj la frukto de la Arbo de l' Vero. Kaj en ĉiuj tiuj stadioj devas li kroĉi sin al la robo de l' obeado al ĉio dekretita kaj firme teni sin al la kordono de l' evitado de ĉio malpermesita, por ke trinku li el la kaliko de la Leĝo kaj informiĝu pri la misteroj de la Vero.

Se iuj el la diroj de ĉi tiu Servanto ne estas kom- 86
prenataj aŭ kondukas al perplekso, endas la samon
demandi denove, ke restu nenia dubo kaj brilu la
signifo tiel splende kiel la vizaĝo de la Amato aŭror-
anta desur Ties »eminenta rango«. ⁶⁸

Ĉi tiuj vojaĝoj ne havas videblan finon en ĉi tiu 87
iomtempa mondo, sed la abnegacia vojaĝanto – se
descendas sur tiun nevidebla konfirmo kaj asistas
tiun la Gardanto de la Kozo⁶⁹ – trapasu ĉi tiujn sep
stadiojn per sep paŝoj, ne, pli ĝuste per sep spiroj, ne,
eĉ per unusola spiro, se Dio tion volos kaj deziros.
Prezentas ĉi tio »favoron al tiuj el Siaj servantoj, kiujn
Li mem elektis.« ⁷⁰

Tiuj sorantaj tra la ĉielo de Dia Unueco kaj 88
atingantaj la profundojn de la maro de l' abnegacio
rekonas ĉi tiun urbon – kiu estas la stadio de l' vivo en
Dio – kiel la plej altan stadion de la mistikaj sciantoj
kaj la plej fora hejmlando de la fidelaj amantoj. Sed
por ĉi tiu pasema Ulo el la mistika oceano estas tiu ĉi
stadio la unua pordo de la citadelo de l' koro, tio estas,
la unua enirejo de la urbo de la koro; kaj la koro estas
dotita per kvar stadioj, kiuj estus prezentataj se
troveblus parenca animo.

Subita skuo la plumon trafis,
La paĝo ŝiriĝis kaj tordiĝis,
Kiam atingis la plumo la punkton
Ke redonu ĝi tian staton. ⁷¹

BAHÁ'U'LLÁH

* * *

89 Ho mia amiko! Multaj ĉashundoj ĉi tiun gazelon en la dezerto de l' unueco ĉasas; multaj agloj ĉi tiun najtingalon en la ĝardeno de l' eterneco penas kapti. Korvoj de l' malamo embuskas ĉi tiun birdon de la ĉieloj de Dio kaj la envia ĉasisto postkuras ĉi tiun cervon sur la paŝtejo de l' amo.

90 Ho ŝejko! Faru el via penado vazon, ke eble povas ĝi ŝirmi ĉi tiun flamon kontraŭ oponentaj ventoj, kvankam ĉi tiu flamo sopiras esti instigita en la lampo de la Sinjoro kaj brili en la niĉo de l' spirito. Ĉar la kapo levita pro la amo al Dio certe estos faligita per la glavo, kaj la vivo flamanta pro sopiro estos certe estingita, kaj la koro kroĉiĝanta al la memoro de la Amato estos certe rompita. Kiel prave estas dirite:

Vivu libera de amo, ĉar ĝia paco

Estas aflikto kaj ĉagreno je ĉiu spiro.

Komenciĝo ĝia estas nur veo kaj doloro;

Finiĝo ĝia estas nur perdo kaj morto.⁷²

Paco estu al tiu, kiu sekvas la vojon de l' gvidado!

91 Viaj originalaj pensoj esprimitaj pri la simbolismo entenata en la vorto »pasero« estas konsideritaj.⁷³ Vi ŝajnas havi fundajn sciojn pri mistikaj veroj. Tamen, en ĉiu regno estas al ĉiu litero donita signifo, kiu

rilatas al tiu regno. Efektive trovas la vojaĝanto sekreton en ĉiu nomo kaj misteron en ĉiu litero.

Iusence aludas ĉi tiuj literoj al la statoj de sankteco. 92
La unua signifas: »Liberigu vin mem de la instigoj de la memo kaj tiam alproksimiĝu al via Sinjoro.« La dua signifas: »Purigu vin de ĉio krom Li, por ke vi oferu vian vivon pro Li.« La tria signifas: »Retiriĝu de la sojlo de la unusola vera Dio se ankoraŭ posedas vi surterajn atributojn.« La kvara signifas: »Danku al via Sinjoro sur Lia tero, por ke Li benu vin en Sia ĉielo, kvankam en la regno de Lia unueco estas Lia ĉielo la sama kiel Lia tero.« La kvina signifas: »Forigu de viaj okuloj la vualojn de l' limigiteco, por ke eksciu vi tion, kion vi ne sciis pri la statoj de l' sankteco.«

Se aŭskultus vi la melodiojn de ĉi tiu pasema Birdo, 93
elektus vi la eternan kaj senmortan kalikon kaj rezignus pri ĉiu efemera kaj pereanta taso. Paco estu al tiu, kiu sekvas la vojon de l' gvidado!

Notoj

- ¹ Shoghi Effendi, *Dio preterpasas* 193
- ² Shoghi Effendi, *Dio preterpasas* 223
- ³ Shoghi Effendi, *Dio preterpasas* 224 k 227
- ⁴ El antaŭe ne jam tradukita Tabelo
- ⁵ La Manifestiĝo de Dio
- ⁶ Komparu: *La Nobla Korano* (Italo Chiussi, Kopenhago 1970) 6:104. En tiu ĉi traduko estas citaĵoj el la Korano prefere laŭvorte transprenitaj el la traduko de Chiussi; kie tamen la ĉi-verka angla traduko forte mal-similas tiun estas farita alia versio surbaze de la ĉi-verka. Ekzemplo estas tiu ĉi verso 6:104, kiu en la traduko de Chiussi tekstas: »La okuloj ne atingas Lin, sed Li atingas la okulojn. Li estas la Nekonebla, la Ĉiokonanta.«
- ⁷ Aḥmad, Muḥammad and Maḥmūd estas nomoj kaj titoloj de la Profeto derivitaj de la verbo »laŭdi«, »glori«.
- ⁸ *La Nobla Korano* 17:111
- ⁹ Komp.: *La Nobla Korano* 76:2
- ¹⁰ Laŭvorte „en la ĝardeno *Ghawthíyyih*“. La *Risáliy-i-Ghawthíyyih* estas mistika traktaĵo de 'Abdu'l-Qádir-i-Gílání (ĉ. 1077–1166). La sekva frazo estas citaĵo el tiu verko.
- ¹¹ Komp.: *La Nobla Korano* 2:283, 16:70
- ¹² *La Nobla Korano* 20:48
- ¹³ 'Aṭṭár (ĉ. 1119–1230) en sia *Manṭiqu't-Ṭayr* (*La Konferenco de la Birdoj*) priskribas sep valojn tra kiuj pasas la birdoj serĉe al sia reĝo. Bahá'u'lláh uzas la skemon de 'Aṭṭár de la sep valoj. Rúmí (1207–1273) aludas al la »sep urboj de l' amo« trapasitaj de 'Aṭṭár.
- ¹⁴ Komp.: *La Nobla Korano* 29:70
- ¹⁵ Maĵnun (Majnún) signifas »frenezulo«. Tio estas la nomo de la celebrata amanto el antikva persa kaj araba rakonto, kies amatino estas Lejli (Laylí). Simbolo por vera homa amo borde de la dia, estis la rakonto la temo de multaj persaj romantikaj poemoj, plej fama inter ili tiu de Nizámí verkita en 1188.

LA SEP VALOJ

- ¹⁶ Araba proverbo
- ¹⁷ Laŭ la islama kredkonfeso: »Ne estas alia Dio krom Dio kaj Mohamedo estas la Mesaĝisto de Dio.«
- ¹⁸ Saná'í (ĉ. 1045–1131)
- ¹⁹ Saná'í
- ²⁰ *La Nobla Korano* 50:31
- ²¹ Rúmí
- ²² Aludo al la tradicio (hadito; arabe: hadīth) laŭ kiu Dio diris al la Profeto Mohamedo tiujn ĉi vortojn: »Se ne por Vi, Mi ne estus kreinta la sferojn.«
- ²³ El poemo de Bahá'u'lláh
- ²⁴ Hátif-i-Işfahání (mortis 1783)
- ²⁵ *La Nobla Korano* 67:4
- ²⁶ *La Nobla Korano* 41:54
- ²⁷ El tradicio
- ²⁸ Shaykh Abú Ismá'íl 'Abdu'lláh Anşá'í el Hirát (1006–1089), sufiisma majstro, poeto kaj klerulo.
- ²⁹ *La Nobla Korano* 1:6
- ³⁰ Rúmí
- ³¹ *La Nobla Korano* 2:157
- ³² *La Nobla Korano* 4:79
- ³³ Komp.: *La Nobla Korano* 18:40; en ĝia Esperanto-traduko tamen tiu ĉi frazo mankas.
- ³⁴ La Profeto Mohamedo
- ³⁵ Rúmí
- ³⁶ *La Nobla Korano* 16:62
- ³⁷ El tradicio
- ³⁸ El tradicio

BAHÁ'U'LLÁH

³⁹ *La Nobla Korano* 83:29

⁴⁰ El tradicio

⁴¹ El preĝo de Imamo Ali ('Alí)

⁴² »Se ne por Vi« estas indiko de la tradicio citita en noto 26. »Ni malsukcesis koni Vin« aludas al preĝo atribuita al Mohamedo kiu vortas: »Ni ne konis Vin, ho Dio, kiel devus Vi esti konata«. Kaj »aŭ eĉ pli proksima« aludas al *La Nobla Korano* 53:10.

⁴³ Sa'dí (ĉ. 1213–1292), aŭtoro de *Gulistán* kaj aliaj poeziaj verkoj

⁴⁴ El tradicio

⁴⁵ Rúmí; aludo al *La Nobla Korano* 18:72

⁴⁶ *La Nobla Korano* 57:4

⁴⁷ Rúmí

⁴⁸ Tio ĉi estas pri Bahá'u'lláh mem, Kiu ankoraŭ ne estis deklarinta Sian mision.

⁴⁹ *La Nobla Korano* 4:131

⁵⁰ Komp.: 'Aṭṭár

⁵¹ Ibn-i-Fárid (1181–1235)

⁵² El tradicio

⁵³ *La Nobla Korano* 50:23

⁵⁴ Saná'í

⁵⁵ La Profeto Mohamedo

⁵⁶ El tradicio

⁵⁷ Rúmí

⁵⁸ *La Nobla Korano* 9:51

⁵⁹ Rúmí

⁶⁰ *La Nobla Korano* 76:6

⁶¹ El tradicio

⁶² *La Nobla Korano* 28:89

LA SEP VALOJ

⁶³ *La Nobla Korano* 15:22

⁶⁴ Hátif-i-Işfahání

⁶⁵ El tradicio

⁶⁶ Atribuita al Rúmí

⁶⁷ Aludo al du sufiismaj konceptoj. La doktrino de la unueco de la ekzistado estas kutime asignita al Ibnu'l-Arabí (1165–1240), tiu de la unueco de la aspekto al Aḥmad Sirhindí (1564–1624). Vidu 'Abdu'l- Bahá, *Some Answered Questions* (Kelkaj responditaj demandoj), ĉapitro 82.

⁶⁸ *La Nobla Korano* 17:80. Aludo al la rango de la Manifestiĝo de Dio.

⁶⁹ »La vorto »Gardanto« en la *Sep Valoj* ne rilatas al tiu de la bahaa Gardanteco.« (El letero datita 8a de januaro 1949 kaj skribita komisiite de Shoghi Effendi.)

⁷⁰ *La Nobla Korano* 2:91

⁷¹ Rúmí

⁷² Ibn-i-Fárid

⁷³ En tio, kio sekvas, Bahá'u'lláh interpretas la signifon de ĉiu el la kvin literoj el kiuj konsistas la vorto »pasero« (gunjishk, pron. gonješk) en la persa.

Tradukita al Esperanto de Bahaa Esperanto-Ligo (BEL)

laŭ la angla aŭtoritata teksto troviĝanta en:

The Call of the Divine Beloved. Selected Mystical Works of Bahá'u'lláh (La voko de la Dia Amato. Elektitaj mistikaj verkoj de Bahá'u'lláh), Bahaa Mondcentro, 2019;

<https://www.bahai.org/library/authoritative-texts/bahauallah/call-divine-beloved/>

Ĉiuj rajtoj rezervitaj

© Kopirajto por la Esperanto-traduko: Bahaa Esperanto-Ligo 2025

Eldono de Bahaa Esperanto-Ligo

ĉe

Mazloum Media, Druck & Verlag

<https://www.mazloum.de/>

verlag@mazloum.de

D-63065 Offenbach 2025

Unua eldono

ISBN 978-3-948273-15-6

Kovrila aranĝo: la eldonejo